

# KOMENCANTOJ '98

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj

## redakcie

Karaj legantoj!

Denove pasis ses semajnoj. La redakcia teko pleniĝis je diversaj reejoj kaj kontribuoj, kio certe ĝojigas niajn korojn.

En la listo de perantoj aperis nova adreso —  $\Sigma$  nun havas Ĉeĥion en sia ĉeno.

Ĉi-numere ni finas serion de eseoj pri la skiza historio de esperantistaj periodaĵoj.

Redaktoro de "Juna amiko" Geza Kurucz prezentas sian revuon.

En gramatika parto ni komencas novan rubrikon "LINGVAJ RESPONDOJ", — kiujn faris mem Ludoviko Zamenhof, iniciatoro de Esperanto.

Ludmila Leksina prezentas siajn parodiojn al la poemoj de NEKONATULO, kio signifas, ke ĉirkaŭ  $\underline{K}$  komenciĝas literatura vivo.


(La redakcio petas pardonon ĉe s-ro NEKONATULO pro kelkaj domaĝaj mistajpoj.)

Ni gratulas nian kunlaboranton el Londono Bill Thorne okaze de sukcesa operacio kaj prezentas liajn verkojn.

Denove en nia gazeto aperis aforismoj. Grandan serion el sia kolekto sendis ano de Londona E-klubo Peter Miles. Tre bonajn aforismojn kaj anekdotojn kolektis kaj tradukis Svetlana Uspahodjajeva el Severodvinsk.

Sur la lasta paĝo vi trovos tradiciajn adresojn por korespondi kaj reklamon de la Brazila eldonejo kun nova libro.

\*\*\*\*\*



nekonata aŭtoro

"Komencanto"

Bill Thorne

Tre bela blanka kato en la neĝo.

**KOMENCARTO**

1998 numero 2  
fondita en 1992  
8 numeroj jare  
redaktas kaj eldonas:  
Viktor Kudrjavcev  
konstanta kunlaboranto:  
Rafija Jafasova  
adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando  
abontarifo por 1998:  
internacia tarifo:  
24 nederlandaj guldenoj aŭ  
12 usonaj dolaroj  
orienteŭropa kaj latinamerika tarifo:

10 usonaj dolaroj  
konto ĉe UEA: vkud-a  
ruslanda tarifo:  
32 (000) рублей (za 8 nomerov v god) prostym poĉtovym perevodom na imja Kudrjavceva Viktora Vasильевичa: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132

**PERANTOJ de****KOMENCARTO**

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton

**ĈEĤIO**

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

**ESTONIO**

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

**ITALIO**

Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

**POLLANDO**

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Bróniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawska

**SVEDIO**

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

**SVISLANDO**

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

**UKRAĪNIO**

Dmitriĭ Cibulevskij, ab. skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

Historiaj studoj de Z

**Post la dua mondmilito****ĝis hodiaŭ**

Post la dua mondmilito denove ekfunkciis la jam menciitaj periodaĵoj - Esperanto, Heroldo de Esperanto, Sennaciulo, multaj naciaj revuoj kiel La Brita Esperantisto, Bulgara Esperantisto, ktp.

Tuj post la mondmilito ekaperis Austria Esperanto-Revuo (1946), startis en 1947 Esperanto en Skotlando, en Federacia Respubliko Germana Germana Esperanto-Revuo, en Hispanio ekde 1949 ĝis nun funkcias Boletin.

ELNA - (Esperanto Ligo por Norda Ameriko) ekeldonis The North American Esperanto Review, poste ĝin anstataŭis Lumo, kiu iĝis organo de la kanada landa asocio en 1962, kaj de Newsletter ekde 1964, organo de ELNA.

En Suda Afriko ekde 1964 aperas Bona Espero, la jaron poste aperis Der Esperantist en Germana Demokratia Respubliko. En Nederlando Komuna Esperanta Gazeto (1969).

Aperadis multaj junularaj revuoj, malgraŭ ke ili aspektis iom modeste, kelkfoje havis tre altiran enhavon - Kial Ne? (brita), Kvinpinto (sveda), Tamen (pola), Jen (usona), Impulso (brazila). Ek de 1950 aperas tre belaspekta El Popola Ĉinio, riĉe ilustrita.

El kulturaj revuoj en Svedio Malgranda Revueto, daŭre funkciis japanaj La Revuo Orienta, Oomoto, jugoslava Suda Stelo reaperis en 1948.

El literaturaj revuoj Norda Prismo, redaktata de F.Szilagyi, poste W.Auld. Inter 1955 kaj 1962 vivis La Nica Literatura Revuo

sub la redaktado de G.Waringhien.

En 1970 kaj ĝis nun vivas Literatura Foiro, altkvalita kaj bonaspekta literatura revuo sub gvido de G.Silfer.

Ekde 1964 funkcias Biblia revuo, 1963 Homo kaj Kosmo - popularsciencia, Internacia Fervojisto, organo de Fervojista Federacio. 1958 — Internacia Ĵurnalisto — organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. 1979 - Monato - internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo de S.Maul. Restartis Internacia Pedagogia Revuo. En 60-aj jaroj — Medicina revuo. Por patroj kaj infanoj Kalejdoskopio. Por naturamikoj - Migranto en 1951. Por aŭtomobilistoj — Aŭto-Revuo en 1965. Por kolektantoj — La Kolektanto Internacia ekde 1961. Espero katolika samtempe.

Aperas relative nova revuo La Kancerkliniko - pri ĉio, skandala, redaktata de Jak Le Puil.

En Sovetunio frekvencis bultenoj Kurte kaj Aktuale. Dum lastaj jaroj Ruslanda Esperantisto kaj La ondo de Esperanto. El Hungario aperas dusemajna revueto Eventoj, respegulanta la plej freŝajn eventojn en la esperantista mondo.

Entute oni kalkulis pli ol 110 periodaĵojn, kiuj aperas sufiĉe regule. Por hodiaŭ la plej gravaj, konataj kaj popularaj inter esperantistoj estas Esperanto, Heroldo de Esperanto, Monato, El Popola Ĉinio, Literatura foiro, La Ondo de Esperanto. Junularaj — Juna Amiko, TEJO Tutmonde, Kon-takto.

**DANKON!**

Al Bill Thorne pro nova rubando donacita por la redakcia tajpilo.

La sekva numero de **KOMENCARTO** aperos la 1-an de junio 1998

bona

humoro

de *Juna Amiko*VALORO de RIDETO

Por rideto oni elspezas nenion kaj enspezas multon. Ĝi riĉigas la ricevanton kaj ne faras almozulo la donanton.


Ĝi daŭras nur momenton, sed memoro pri ĝi, kelkfoje, restas por eterne.

Neniu estas tiel riĉa, ke li povus vivi sen ĝi, kaj neniu estas tiel malriĉa, ke li ne fariĝus pli riĉa per ĝi.

Ĝi firmigas bonvolon en negoco, estigas feliĉon en la familio kaj ie ajn ĝi estas certa signo de amikeco.

Ĝi estas ripozo por laciĝinto, sunvarmo por fido-perdinto, lumo por malgajulo kaj la plej efika kuracilo de la naturo kontraŭ zorgoj. Ĉe neniu ĝi estas konsiderata kiel surtera havaĵo: oni povas ĝin nek aĉeti, nek akiri, nek prunti aŭ ŝteli — oni povas ĝin nur donaci. Kiam iu estas jam tro laca por rideti, estu almenaŭ vi, kiu rigardas al li kun rideto.

Neniu bezonas rideton pli ol tiu, kiu ne plu povas rideti. Se vi volas iĝi amata: *RIDETU!*

STRANGAJ ARGUMENTOJ

Du infanoj interparolis:

— Jen vidu, miaj piedoj ne estas tiom malpuraj, kiom la viaj.

— Kompreneble, ĉar vi estas tri jarojn pli juna.

\*\*\*

# Juna Amiko

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE **ILEI\***  
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

**Redaktoro:** Geza KURUCZ  
Hítel u. 10, fszt. 16, HU-6000  
Kecskemet, HUNGARIO  
**Administranto, ekspedo:** *Stefan MacGill*, pf. 193, HU-1368  
Budapest, Hungario  
**Rete:** [bjg@mail.datanet.hu](mailto:bjg@mail.datanet.hu)  
**Hejmapaĝo:**  
<http://w3.datanet.hu/~big.esperanto>

24 paĝa revueto, kiu aperas 4 foje jare en du-kolora preso. Formato A5. Ĝin iniciatis hungaro *Geza KURUCZ* antaŭ 25 jaroj dum la somera konferenco de ILEI\* en Maribor 1972.

Post li la redaktoran standardon reprenis *Oldrich Knichal*, poste *Stefan MacGill*, kiu levis tiun standardon al la signife alta pinto de sukceso por esperantista periodaĵo - 3000 ekzempleroj kun abonantoj en 82 landoj de la mondo. En 1997 la redaktadon denove prenis en siajn manojn *Geza KURUCZ*, (Hungario).

Redakcio de la revuo estas plene internacia, ĝin eniras kunlaborantoj el 14 landoj, inter kiuj 3 grafikistoj.

La revuo publikigas nur mallongajn verkojn. Ĝi havas konstantajn rubrikojn: Nia movado, Landoj de la mondo, Humuro, Deziro korespondi, Enigmoj, Nia medio, Komputiko, Ludoj, Kantoj, Poemoj, Rakontoj aŭ fabeloj, El nia historio, Por kursgvidantoj, Novaĵoj, Lingva doktoro, Interesaĵoj k.a.

La revuo, kiu havas apartan lingvan revizianton, s-ro'n Andre Albault, prezidinto de E-Akademio, uzas simplan lingvaĵon. Sen piednotoj ĝi uzas nur 1237 vortradikojn, la plej oftajn, kiuj estas eldonitaj ĉe tiel nomata minimum-vortaro.

Juna Amiko nun estas eldonata en 3000 ekzempleroj kaj estas legata en 82 landoj de la mondo. Ĝi sendube apartenas al unu el la plej popularaj Esperantaj periodaĵoj.

La legataro de Juna Amiko formas tutmondan familion en ĉiu kontinento. Tio eblas ĉar ILEI fiksas abon-tarifojn proporcie al viv-nivelo. Krome ĝi donas grandajn rabatojn por kvantaj mendoj.

**Abonkondiĉoj:**

ĉe UEA en Roterdamo 19 Nederlandaj guldenoj por la jaro.  
por Ruslando: 620014, ab.ja. 162, Gorecka Halina Romanovna,  
30 rubloj por unu abono.

(\*) ILEI -Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# GRAMATIKAJ ELEMENTOJ

Karaj legantoj,

en la antaŭa numero ni prezentis **AKUZATIVON**, kiel unu el la plej malfacilaj elementoj de Esperanto-gramatiko. Kaj tuj evidentiĝis, ke ni "komencis ne de tiu komenco", ĉar en la teksto estis vortoj kiel *verbo, prepozicio*...Ili mankas en la minimumaj vortprovizoj por komencantoj kaj vere ilin bezonas nur spertaj instruistoj. Ja plejparte Esperanton instruas helpe de nacia lingvo.

Sed **KOMENCANTO** aperas nur Esperantlingve, tial en niaj gramatikaj studoj bezonatas nomoj de parolelementoj kaj vortelementoj. Ni do prezentas hodiaŭ ilin por vi.

## NOMOJ de PAROLELEMENTOJ

Parolelemento — vorto, rigardata laŭ ĝia gramatika kategorio.


|                                 |   |                     |
|---------------------------------|---|---------------------|
| domo, knabo, libro ...          | — | <b>substantivoj</b> |
| bela, bona, alta, ...           | — | <b>adjektivoj</b>   |
| bone, bele, rapide ...          | — | <b>adverboj</b>     |
| mi, vi, li, ...iu, tia, kio ... | — | <b>pronomoj</b>     |
| ami, iris, kantas, skribos ...  | — | <b>verboj</b>       |
| unu, du, ...dek, ...cent...     | — | <b>numeraloj</b>    |
| al, sur, en, sub, trans ...     | — | <b>prepozicioj</b>  |
| ĉar, kaj, sed ...               | — | <b>konjunkcioj</b>  |
| ah!, ho!, ho-ho!, hura!, nu ... | — | <b>interjekcioj</b> |

### **participoj**

|                            |   |                |
|----------------------------|---|----------------|
| leginta, leganta, legonta, | — | <b>aktivaj</b> |
| legita, legata, legota.    | — | <b>pasivaj</b> |

## NOMOJ de VORTELEMENTOJ

ni rigardu iun kunmetitan vorton, kiu havas ĉiujn vortelementojn, ekzemple *malvarmigilo* (=fridujo).



# LINGVAJ RESPONDOJ

*Dum la tuta sia vivo L.L.Zamenhof estis la plej granda aŭtoritato en gramatiko de Esperanto. Li publike respondis al multaj gramatikaj demandoj per tiamaj gazetoj kaj journaloj. Tiuj liaj respondoj e! gazetoj inter 1889 — 1912 eldonis "Esperantista centra librejo" en Parizo en 1927 libroforme sub titolo "Ludoviko Lazaro Zamenhof. LINGVAJ RESPONDOJ. Plena kolekto." En 1992 ĝin reeldonis en Jekaterinburg eldonejo SEZONOJ.*

*Mi opinias, ke multaj gramatikaj momentoj, klarigitaj de Zamenhof, estas ankaŭ aktualaj hodiaŭ, ĉar novaj korespondaj kursaĵoj de Esperanto ofte demandas min pri la samo. Do, la redakcio decidis publikigi la plej interesajn respondojn de nia Majstro.*

**Viktor Kudrjavec**

## PRI LA DIVIDO DE VORTOJ

Transportante la vortojn el unu linio en la sekvantan, ni ordinare dividas ilin per iliaj partoj gramatikaj, ĉar ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton. Tiel ni ekzemple dividas "Esperanto", "ricev-ita" k.t.p. Sed tio ĉi tute ne estas deviga regulo; ni faras ĝin nur por ne rompi subite kun la kutimoj de aliaj lingvoj: efektive tiu ĉi maniero havas nenian celon kaj signifon, ĉar la transportado de la vortoj estas afero pure papera, havanta nenion komunan kun la leĝoj de la lingvo; ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi dividos ekzemple "apartenis", ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon.

*Esperantisto, 1893, p.32.*

Bill Thorne

# Limerike

Bill Thorne, fidela amiko de  $\Sigma$  el LONDONO (Britio) denovas. El lia letero: "Vidu! Estas mi! Mi vivas denove post la operacio! Vi demandis unue, ke mi traduku kelkajn anglajn limerikojn. Neeble. Unue, ĉar la vortoj ne rimas, due ĉar la ritmo de la vortoj ne estas sama.... Oni ofte komencas denove, kaj verkas alion, tradukante kanton aŭ poemon, ekzemple:

*There was a young man from Darjeling,  
Who Travelled from Putney to Ealing.  
It said on the door, (on the bus)  
"Please don't spit on the floor"  
So he lay down and spat on the ceiling,*



**Estis juna viro el Darjelingo  
Kiu vojaĝis el Putney al Ealing  
Anonco sur la pordo ( de la aŭtobuso) petis,  
"Bonvolu ne kraĉi sur la plankon"  
Do li kuŝis kaj kraĉis sur la plafonon.**

Limeriko estas angla  
versaĵa formo el kvin  
versoj, el kiuj la unua,  
dua kaj kvina rimas  
inter si (respektive la  
tria kaj kvara)



En la mansamulejo, sub la influo de drogoj, mi verkis ĉi-tion por la komenco por KOMENCARTO"

**Mi sendube ŝatas tabakon,  
Mi fumis preskaŭ kiel Drako!  
Kun granda cigar',  
Kaj terura flar',  
Mi faras personan atakon!**



**Aŭskultu, aŭskultu ĵazon!  
Provu esprimi ekstazon!  
Aspektu Uŝone,  
Dancu persone,  
Kaj laŭte parolu per nazo!**

# Parodie

Ludmila Leksina

En la antaŭa numero de "K" aperis tri poemoj de Nekonatulo. La versaĵoj plaĉis al la legantoj malgraŭ kelkaj bedaŭrindaj mistajpoj. L.Leksina el urbo Sudĵa (Kurska obl.) skribis al la redakcio: "Kiam mi legis versojn de Nekonatulo, mi komprenis vortojn "aromas frambovino" kiel "aromas fram+bovino". Kia bovino aromatas? Poste mi longe ridis. Kaj tiam mi verkis parodiojn". En la nomo de la redakcio mi devas rimarki, ke oni ne verkas parodiojn al la malbonaj poetoj. Ni do gratulas nian aŭtoron  $\Sigma$ , ke liaj poeziaĵoj ne restas sen atento.



"En la ĉambro..."

En la ĉambro nun ne estas lumo  
Neniigis de kandelo fumo.  
Kiel oni aromatas per bovino?  
En la lito min brakumas amatino

"Lernantino"

Elvoka bluzeto...  
Mallonga jupeto...  
La viro tumultis  
Kaj iĝos poeto

"Varsovio, aŭgust, konatiĝo."

Tatarstano, marto, konatulo,  
Konatiĝas li kun lernantinoj,  
Lin memoras liaj amatinoj.  
Vidis lin Eŭropo en anguloj...  
Kial estas li "nekonatulo"?

*Aforismo estas novelo, el kiu redaktoro forstrekis  
ĉion superfluan.*

Kolekto kaj traduko de *Peter Miles*,  
membro de la Londona E-a klubo

[La Londona Esperanto-klubo, Fred Tallant Hall, 153  
Drummond Street, London, NW12PB. Vizitantoj  
bonvenas ĉiun vendredon 18.30 — 22.00]

\* Jen la amuza afero pri la vivo: se oni  
rifuzas akcepti ĉion krom la plej bonan,  
oni tre ofte tion ricevas.

\* Kuraĝo tre gravas. Kiel muskolo ĝi  
plifortiĝas per uzado.

\* La vivo estas nia por servi, ne konservi.

\* Se vi opinias, ke vi povas - vi povas, se  
vi ne povas - vi pravas.

\* Mi preferus malsukcesi pri io agrabla, ol  
sukcesi pri io malplaĉa.

\* Ne ekzistas mallongaj vojoj al loko  
vizitindaj.

\* Afablaj vortoj povas esti mallongaj kaj  
facile direblaj, iliaj eĥoj eternas.

\* Infanoj pli bezonas modelojn ol  
kritikojn.

\* La plej bona metodo venki en disputo  
estas komenci per praveco.

\* Kiu parolas vere, tiu sidas komforte.

\* Venkantoj neniam cedas, cedantoj  
neniam venkas.

\* Nenio tiel embarasas kiel rigardi al iu  
kiu faras ion, kion vi deklaris nefarebla.

\* La estonto kutimas alveni senanonce.

\* Vere estas ke oni ĉiam scias kiel fari  
ĝuste, malfacile estas tiel fari.

\* La averaĝa turistoj volas viziti kie ne  
estas turistoj.

\* Mia patro ĉiam konsilis: "Trovu  
postenon kiun vi amas kaj neniam dum la  
vivo vi devos labori eĉ unu tagon.

\* Por eviti kritikon - faru nenion, diru  
nenion, estu nenio.

A

F



R

I

S

M



J

Kolekto kaj traduko de *Uspahogajeva  
Svetlana*, [RU-164521, Arhangelska ob.,  
SEVERODVINSK, Lomonosova, 14-31. ]

\* Aforismo estas novelo, el kiu redaktoro  
forstrekis ĉion superfluan.

\* Se vi ne povas eviti malsanojn, evitu  
almenaŭ doktorojn.

\* Se vi ne povas fari tion, kion vi ŝatas,  
ŝatu tion, kion vi faras.

\* La vero ĉiam estas sekreta.

\* Homo ĉiam havas tion, kion li povas  
perdi.

\* Homoj ofte uzas sian saĝon por fari  
malsaĝaĵojn.

\* Silentema malsaĝulo estas jam saĝa  
homo.

\* Kiom ajn da mono ni havas, ĝi ĉiam  
mankas, kaj kiom ajn da saĝo ni havas, ĝi  
ĉiam sufiĉas.

\* Geniuloj, certe, estas senmortaj, sed  
malsaĝuloj vivas pli longe.

\* Koro de virino estas pli saĝa ol ŝia saĝo.

\* Legu librojn! Kelkaj el ili estas verkitaj  
nur por tio.

\* Por fari homon feliĉa, necesas antaŭe  
forpreni ĉion kaj poste doni malmulte.

*Vladimir Jugajk*, [172750, Tverskaja  
ob., OSTAŜKOV, Mikrorajon, 16-  
20.]

\* Ĉiu rezisto venkiĝas per insisto.

\* Legado - jen pli bona lernado...

\* Naturo ne scias halti en sia movado kaj  
ekzekutas ajnan senagadon.



Uspahogajeva Svetlana  
RU-64521, Arhangel'ska ob.,  
SEVERODVINSK,  
Lomonosova, 14-31.

En biblioteko:

— En tiu ĉi libro mi trovis la centrublan monbileton. Ĉu vi havas aliajn librojn de la sama aŭtoro?

\* \* \*

— Kia estas nomo de via fraĉjo?  
— Mi ne scias tion. Li estas malgranda kaj ne povas paroli.

\* \* \*

— Paĉjo, mi devas diri ion al vi...  
— Diru, nur koncize kaj klare.  
— Cent rublojn!

\* \* \*

Doktoro demandas malsanulon:

— Ĉu via memoro boniĝis?  
— Jes, ĝi boniĝis, sed kiu estas vi? Kial vi interesiĝas pri tio?

Oni diris al kato:


— Prenu dek monerojn kaj portu ilin al hundo.

La kato respondis:


— Mi faros la unuan agon kun plezuro, sed komisiu al iu alia fari la duan.

\* \* \*

En la fenestro de la unua vendejo pendas reklamo:



En la fenestro de la najbara:



## Leterkesto

*Geografio de nia legantaro kreskas de numero al numero. Ni estas ege dankaj pro la atento! Kaj denove invitas ĉiujn kunlabori kun **KOMENCANTO**, simile al la samideano Jian Weijian el Ĉinio*



Mi eksciis pri la ekzisto de la gazeto **KOMENCANTO** ...Verŝajne ĝi estas nov-naskito en la E-gazetaro? Varman gratulon! Mi estas nek komencanto nek komencanta aŭtoro. .. Tamen ni ankoraŭ havas belajn memorojn pri miaj komencantaj jaroj, kaj konas la korojn de komencantoj — iliajn revojn, ĉagrenojn, idealojn, k.t.p. Tial mi tre ŝatus regule ricevi vian revuon kaj regule verki por ĝi, ĉar mi volas resti en kontakto kun komencantoj tutmonde, laŭeble helpi ilin, kaj ĉiam konservi mian fervoron pri nia lingvo.

(Jian Weijian, Tong fu zhong Lu, Sci ba nu heng 4 Hao, CN-510240 Guangzhou, ĈINIO)



Elkore ni, klubanoj de Boruĝerdo E-movado salutas vin. Ni legis vian anonceton en "ESPERANTO" kaj tre ŝata: ricevi la revuon **KOMENCANTO**, ĉar multaj komencantoj ekzistas en nia regiono... Ĉu ni povas kunlabori kun vi pri sendi artikolojn aŭ aliajn esperantajjn por aperigi en **KOMENCANTO**? Ankaŭ grandparto de irananoj deziras korespondi... Ni senpacience atendas ricevi KOMENCANTOn plej baldaŭ.

(Saiid Pakravan, universitata profesoro de la literaturoj angla kaj USona, P.O.Box 199, IR-69135, Boruĝerd, IRANO)

respondoj al la ENIGMOJ de  
Hajdarova Violetta el la 2-a numero:  
1. nenio 2. katidoin 3. sur mapo 4. multe

## PAROLAS VARSOVIO

Ĉi-sube ni metas la horaron de pola radio en esperanto kaj ĝian mesaĝon kaj petas ĉiujn abonantojn de "**KOMENCANTO**" skribi al la Pola Radio kaj peti programon de radioelsendoj, kiun ili sendos al vi senpage!

**POLA RADIO, ESPERANTO REDAKCIO** PL-00-977 Varsovio, Poŝtfako - 46, Pollando  
reto (Internet) :pettyn@radio.kom.pl; fakso: 48-22-645-5917

15.30 41,18 m (7285 kHz)  
20.00 49,22 m (6095 kHz)  
22.30 41,27 m (7270 kHz)

*La radielsendaj horoj estas indikitaj laŭ vintra mez-eŭropa tempo.  
La elsendoj estas ĉiutagaj kaj prilumas sekvajn direktojn:  
koncerto kun bondeziroj, esperanto-gazetaro, familiaj temoj, kultur-temoj, homoj kaj problemoj, leterkesto, esperanto-ekspreso*

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn  
Por pagintaj abonantoj de "x" - senpage

*Japanana Esperanto-Koresponda-Servo*  
konstante akceptas korespondajn proponojn kun japanoj. Skribu unuope al:  
KLEG, Sonehigasi,  
1-11-46-204, Toyonakasi 561, JAPANIO

*Didoviĉ Oksana*  
20j., angla lingvo

Bajkalskaja, 45-40  
MOSKVA  
107589  
RUSLANDO

*Saiid Pakravan*  
universitata profesoro pri angla literaturo serĉ. korespond. por siaj klubanoj  
P.O.Box 199  
IR-69135  
BORUJERD  
IRAN

*Sokolova Tatjana*  
18 j., sporto, muziko  
Krasnoflotskaja, 2a  
KARLOVKA  
Poltavskaja ob.,  
315720  
UKRAINIO

*Dina Randriarimanana*  
20 j., ŝtudentino, pri ĵurnalismo, muziko  
lot.07,  
Cite Mandroseza, 101  
ANTANANARIVO  
MADAGASKAR

*AMIKECA RETO*  
servo de Sennacieca Asocio Tutmonda nun posedas rektan ret-adreson, kien vi povas sendi aliĝilojn al informpetojn  
<a.reto@france-association.com>

*Maliŝko Tatjana*  
15 j., aventuraj romanoj, muziko, hundo  
Komarova, 21-14  
ĈUGUEVKA  
Primorskij kraj  
692400  
RUSLANDO

*Bassan Cinzia*  
27 j., pri ĉiuj temoj  
Via Prati 6,  
Ronchi, IT-35010,  
VILLAFRANCA  
Padova  
ITALIO

*Henriël Fidilalao*  
31 j., instruisto kaj verkisto. Pri akupunkturo, filozofio, gastigado, komerco  
s/Lyce, 421  
TSARATANANA  
MADAGASKAR

*Nekludov Aleksandr*  
22 j., filatelo, numismatiko, akvarioj  
2 mikrorajon, 17-77  
BUZULUK  
Orenburgskaja ob.  
461010  
RUSLANDO

*Steoc Sirois-Fournie*  
21 j., korespondi kun knabino 18/25 jara  
881, rue Gallieni,  
SEPTILES,  
G4R 4BI  
KANADO

*Abenova Klara*  
35 j., ĝardenumi, triki,  
Transportnaja, 25-3  
BELOZERSKOJE  
Kurganskaja ob.,  
641330  
RUSLANDO

*Jegorov Sergej*  
17 j., sciencfikcio, moderna muziko  
Sh.Usmanova, 31-26  
KAZANJ  
Tatarstan, 420095,  
RUSLANDO

*Mirosław Morgata*  
21 j., pri ĉiuj temoj  
ul. K.Minarki 51,  
PL-44 203  
RYBNIK  
POLLANDO

*Tibilova Anĵela*  
20 j., muziko, kudri  
Cokolaeva, 8-128  
VLADIKAVKAZ  
362043  
RUSLANDO

*Josef Vich*  
62 j., Operkantisto, pri kantado, muziko kaj lingvoj  
Ke skalkam 2451  
CZ-10600  
PRAHA 10, Zabeĥlice  
ĈEĤIO

*Wenliang Gong*  
pri literaturo  
20 Chenwey  
Lu Habei Qu.  
TIANJIN  
ĈINIO

*Kabanov Dmitrij*  
17 j., lingvoj, sporto, muziko, raraj libroj  
Merkurjeva, 4-55  
OSTROV,  
Pskovskaja ob., 181300,  
RUSLANDO

**KORESPONDI...** listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn. Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonajon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.  
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700  
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

## LA LASTA ELIRO - Fino de la Tempo - Tria Jarmilo

Detala kaj serioza studo pri la antaŭdiroj de la profetoj ekde Jesaja ĝis la nuntempaj predikantoj, inkluzive de Jesuo, la Kristo, pri la evoluado de nia planedo kaj de la ĉi tie loĝanta homaro. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe la eldoninto: SPIRITA ELDONA SOCIETO F.V. LORENZ-Caiha Postal 3133 - BR-2000-970 Rio de Janeiro - BRAZILIO

